

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



Kongresa postrikolto.



Ĉi supre bildo, prenita ekster la Universitato de Lund, post la solena akcepto de la eksterlandaj gastoj en la universitata aŭlo. Gastiganto i. a. la vicurbestro Sandbladh kaj la vicprez. de la urba konsilantaro Holmgren. Inter ili sur la bildo staras f-ino L. Zamenhof. En la unua vico la blankvestitaj knabinetoj, kiuj per sia kantado ravis la gastojn.

N:r 11.
N-o 11.

Nov. 1934.
Nov. 1934.

Pris 25 öre.
Prezo 25 oeroj.

SVENSKA
ESPERANTO-TIDNINGEN
LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.

Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.
Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.
Lösnummer 025.

Annonspris: 15 öre pr mm.

Utkommer en gång i månaden.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: Bernhard Eriksson.

Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.

La administracio: Box 698, Stockholm.

Anonco pri korespondado kostas
2 respondkuponojn.

Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1.

Sekretariatets adress: Drottninggatan 18.

Telefon 20 00 43. Postgirokonto 2012.

Årsavgift för enskilda medlemmar 5 kr.
inkl. tidning, för klubbar 1,40 per medlem
inkl. medlemskap i Universella Esperanto-Förbundet.

Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.
Telefon: Huddinge 279.

Sekr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: Box 698, Stockholm.

Postgiro 515 11.

Förrättar esperanto-examina.

Ordf.: Rektor Sam Jansson, tel. Stockholm 65 02 95. Sekr.: E. Malmgren.

Sv. Lärares Esperanto-Förbund

(Sveda Instruista Esperanto-Federacio)

Ordf.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15,
Göteborg.

Sekr.: Karin Hallengren, "Nytäppet",
Nya Varvet, Göteborg.

Kassör: Oskar Svantesson, Mariagatan
7—9 A, Göteborg.

Årsavgift 2:— kr.

Läroböcker, Ordböcker

m. m.

Systematisk kurs i Esperanto. Av Seppik-Malmgren. En enkel och lätt lärobok för nybörjare... 0:75

Esperanto utan förkunskaper. Av Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50

Övningsbok till d:o. 0:50

Snabbkurs i Esperanto. Av Seppik-Malmgren. Särskilt avsedd för hotell-, restaurant-, bank- och trafikpersonal 0:60

Kurs i Esperanto. Del I. Av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. . . 0:90

D:o. Del II. Läsebok. 0:90

Lärobok i Esperanto för A.B.F. och andra studiecirklar. Av Jan Mas-siak. Inb. 2:50

Kommentarer till d:o. 1:—

Esperanto-Kurso. Av V. Setälä. En enkel och trevlig läsebok. Ill. 0:50

Esperanto-Grammatik. Av Lärov-adj. Nils Nordlund: 1:50

Nyckel till Esperanto. Miniaturlärobok med ordlista. 0:10

Dubbel Fickordbok i Esperanto. Av Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50

Esperantisk-svensk Ordbok. Av P. Nylén. 232 sid. Häft. 3:75

D:o, inb. i hållbart klotb. 5:—

Svensk-Esperantisk Ordbok. Av G. H. Backman. Slutsåld.

Barbro kaj Eriko, en trevlig läsebok, helt på esperanto 0:60

Prepositionerna i Esperanto. Av N. Nordlund. 0:75

Fundamenta Krestomatio. Av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25

Dialogoj en Esperanto. Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Av Einar Dahl. 32 sid. 0:50

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.

Tel. 31 65 01.

Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.

Order överst. 10 kr. försänd. portofritt. Vid ins. av förskottslikvid för mindre order bif. 10 proc. till portokostnader.

Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

I Svenska Esperanto-Förbundet samlas alla svenska esperantister.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Judo aŭ greko.

Esperanto estas nenies propraĵo! Ĝi povas esti uzata de ĉiu ajn por kiu ajn celo. Zamenhof donis al la homaro instrumenton, per kiu la lingvaj muroj estis disbatotaj. Li volis krei interkomprenilon praktikan. Sed unue kaj laste la aŭtoro de Esperanto estis idealisto. Li revis pri venonta tago, kiam la diversaj nacioj forgesis la lingvan diversecon kaj pere de Esperanto konatiĝis unu kun la alia tiom, ke ili komprenas, ke la homaro konsistas el homoj. Iliaj vizaĝoj, haŭtkoloroj, manieroj, moroj, kredoj kaj vivvidpunktoj estas malsimilaj, sed ĉiu havas rajtojn kiel homo. En ĉies brustoj batas koro. Mi kredas, se mi bone komprenis la enhavon de la paroladoj de Zamenhof, ke li antaŭ ĉio pensis pri la homamo. Ĝi estis por li de la frua infaneco ĝis la lasta vivminuto sankta gvidprincipo. Sur la homamo li konstruis sian mondlingvon.

Esperanto povas esti uzata por kiu ajn celo. Tion Zamenhof mem esprimis. Sed mi kredas, ke, dirante tion, li ne deziris, ke la lingvo estu uzata tiamaniere ke ĝi mortigas la fundamentan principon de homa kunvivado.

Judo aŭ greko, protestanto aŭ katoliko, mahometano aŭ budisto, negro aŭ amerikano, ĉio tio estis flankaj aferoj por Zamenhof. Li parolis al kaj volis agi inter homoj. Ni neniam forgesu tion.

Mi scias, ke troviĝas multaj esperantistoj, kiuj skuas la kapon kiam la idealisma flanko de Esperanto estas diskutata. Ili skuu kiom ajn, tio ne povas forigi la fakton, ke la kerno de la ideo de la lingvo estas homamo. Tiu ne malgrandigas la praktikan valoron de Esperanto.

Oni ekmalĝojas legante en la gazetoj, ke troviĝas esperantistoj, kiuj estas tiel nacie aŭ partie blindigitaj, ke ili ne povas permesi ekz. al judaj samideanoj, kiuj dum tuta vivo laboris por Esperanto, aparteni al la landa asocio. Ili certe agas kontraŭ la ideo de Esperanto.

Zamenhof estis judo kiel multaj aliaj herooj de la kulturhistorio. Sed en li ne estis malfido aŭ malsincereco. Lia vivverko estis tia, ke ĝi donos benon kaj feliĉon al la homoj, se la homoj nur komprenos deĉifri lian plej internan penson.

Ni respektu unu la alian. Ĉarlatanoj kaj fihomoj estu punataj, eĉ se ili estus konsiderataj la plej altrangaj. Sed honestaj homoj, kiuj faras siajn devojn laŭpove, estu laŭdataj kaj honorataj, ili estu blankaj aŭ nigraj, longaj aŭ dikaj.

Ne gravas, se mi apartenas al tiu aŭ tiu ĉi raso, se mi havas kurban nazon, ruĝan haŭtkoloron aŭ ne. La eksteraj aĵoj varias, kaj la vario dependas de multaj kialoj. Grave estas, kia homo mi kaj vi estas rilate al pensoj, vortoj kaj agoj.

Einar Dahl.

25-jarulo.

Sub la signo de l' ĝojo kaj kontento Grupo Esperantista de Stockholm la 31-an de oktobro konvene solenis sian 25-jaran jubileon.

Dum 25 jaroj la klubo konstante kaj senlace laboris. De manpleno da membroj ĝi kreskis ĝis ducent kaj la sindo-



Ĉe la jubileo: en la unua vico de maldekstre: E. Håkansson (sekr.), T. Julin, H. Andersson, P. Nylén, E. Hedgren (prez.), Ad. Larson, f-ino H. Josefson, H. Halldor, M. Eriksson.

naj, nedankeblaj pioniroj, la koloroj en la sveda esperanto-movado, povas kontente kaj kun ĝojo en la koro rigardi la produkton de sia dumviva laboro por la sankta trezoro, kiu estas la genia Zamenhofa lingvo.

La interesan historion de la klubo rakontis en neforgesebla maniero la kluba patro kaj honorprezidanto, red. Paul Nylén. Dum unu horo ni per streĉe aŭskultemaj oreloj akompanis la parolanton de la malnovaj tempoj tra lingvaj krizoj, mondmilito, sed ankaŭ tra grandaj sukcesoj kaj progresoj, ĝis la hodiaŭa tempo. Ĉiuj klinas sin antaŭ la personeco kaj fidela laboremece de s-ro Nylén.

En la jubilea kunveno parolis ankaŭ lia kunfondinto, s-ro Ad. Larsson, kaj anc de multaj jaroj John Johansson. D-ro Szilágyi deklamis tre gajan kaj bonhumoran poemon pri la nunaj malnovaj kaj novaj kolonoj en la esperanta vivo.

Cetere ni aŭskultis belan muzikon, aŭdis belan deklamadon kaj konvene finis la naskotagon de la grupo per kolektiĝo ĉirkaŭ la tabloj kaj fine per dancado.

Neniu forgesu ke Esperanto estas kulturlingvo.

Tio signifas, ke ĝi peras la kulturon de unu popolo al ĉiuj aliaj sed nur se la esperanta popolo uzas tiun perilon, la plej bonan el ĉiuj. Se ni faros, nia popolo estiĝos la plej kulturita. Nia kulturo estas la kolekto, la elekto eble de ĉiuj kulturoj, la mondkulturo. Sed nur tiel ke ni studas la gravajn verkojn kiujn niaj eldonistoj publikigas. Tiuj ne estas nur por bibliotekoj ili devas troviĝi en la manoj de la plimulto de niaj samideanoj. Kiel rimedoj por propra spirita evoluo kaj eduko al vera homaraneco. La plej gravaj eble estas antologioj. La nomo ofte timigas. Sed ĉiuj ili enhavas treege interesajn poemojn. Ni memoru, ke la literaturo estas kvazaŭ filmo montranta la vivon de la popolo. Ĉiu popolo ja formiĝas ĉirkaŭ la eminentaj homoj, kiuj esprimas ĝiajn sentojn kaj pensojn, kaj per siaj vortoj gvidas la popolon al celoj atingotaj. Ne forgesu, ke multaj popoloj jam havas tian esperantan filmon. Akiru ĝin por via biblioteko, por via amika rondo, por vi mem.

Stockholm komencis (vidu la okt. n-on)

Göteborg sekvas . . .

Jam por la kvara fojo Göteborg startis la sezonon per publikaj amaskursoj.

La 8-an de oktobro lektoro Seppik faris provlecionon antaŭ plennombra publiko en la aŭlo de Chalmers. La planitaj kvin kursoj kalkulas ĝis po 50 partoprenantoj. Kursaranĝanto estas A. B. F:s Esperantoklubb.

Funkcias ankaŭ multaj aliaj kursoj en apartaj societoj kaj en la ĉirkaŭaĵoj ekzemple en Hisingen, Nya Varvet, Mölndal, Sävedalen, Kungälv kaj Mölnlycke. Pro sia bezono ankaŭ la ĉ. kvindekmembra klubo de tramistoj venigis alilandan instruiston.

Sed ne nur ĉe la plenkreskuloj oni enplantas la lingvon: en alta grado necesas prepari ankaŭ la novan generacion. Tiucele la ABF-klubo jam pasintjare povis disponigi lektoron Seppik por esperantlingvaj prelegoj en multnombraj lernejoj. Ankaŭ ĉi-aŭtune tiu prelegado promesplene jam komenciĝis. Pri la interpretado sur tiu kampo zorgas la esp. instruistoj, ĉefe s-ro Svantesson.

Ekzamena komitato estas starigita. Post kelkjara semado devas maturiĝi la rikolto. Interesiĝi, perfektigi, ekzameniĝi, jen la marŝvojo! Por servi kiel kontrolo, instiganta al lingva profundiĝo; por doni al la lernintoj laŭrajtan memfidon kaj por doni al la ekstera mondo impreson de ordo kaj progreso, jen tasko, kiun devos plenumi la ĝis nun ne sufiĉe atentata ekzamena procedo. Prezidanto en la starigita ekzamenkomitato estas popolinstruisto, s-ro Th. Torbjär.

E. E.

Provinca kongreso de helsingaj esperantistoj.

6.10 okazis inter ĉ. 80 esperantistoj de Helsingland en Hudiksvall je la unua fojo tutprovinca kunveno. Ĝi komencis per publika parolado de redaktoro Hadzi Raden Mustapha pri Java. La paroladon ĉeestis proks. 150 aŭskultantoj, kiujn vere kaptis s-ro Mustapha per sia interesa parolado, la belaj bildoj kaj per la ĉarma kantado. Interpretis la blinda samideano Axel Larsson el Näsvisken.

Tuj post la fino de l' prelego la esperantistoj kolektiĝis ĉirkaŭ bongusta vespermanĝo sur la Komercista Monto. S-ro

Larsson komence ludis fortepiane "Abendfried", komponicion de blinda, norvega komponisto, kaj poste bonven-salutis en Esperanto per kelkaj varmaj vortoj.

S-ro Ivar Norberg el Iggesund enkondukis per kelkaj vortoj diskuton pri la fondo de distrikta organizacio de Helsinglando. Oni unuanime decidis formi sendependan Helsinglandan Esperanto-Distrikton. Oni ankaŭ elektis komitaton, konsistantan el 3 plenumantaj kaj krome 4 pli "konsultativaj" membroj.

Ne mankis en la kongresa programo muziko kaj kanto. S-ro Larsson prezentis tiel fortepianan muzikon kiel kantojn. Li eĉ kontribuis per tablokantaĵo. Virkvarteto el Sandarne kantis tre bele. Unu el la partoprenantoj recitis du historietojn el la kamparo, alia faris svedlingve, mallongan festparoladon. Fine oni povis movi la piedojn en unuhora dancado.

Esperable tiu ĉi kongreseto kunportos bonan rezulton al nia movado en Helsingland en la senco, ke ĝi plivigliĝos la esperantistojn de la provinco al racia kaj progresiga laborado kaj ke ĝi plifortigos la senton de kunaparteneco inter ili.

K. G-n.

La fabelo pri Rozali'.

Laŭ E. A. Karlfeldt.

*Matena vent' silentas
en supro de l' tili',
al mi enl' sonĝ' prezentas
sin eta Rozali'.
En florgardena kaŝ'
min sekvas ŝia paŝ',
kaj aŭdas mi la vokon:
"Ho, mia koramant'
ne lasu vi tiun ĉi lokon,
riposu ĉe mia kant'."*

*Malĝojas mia koro,
doloras la konsci',
kaj kantas mi kun ploro
pri mia Rozali'.
Ĝis de la viv' la fin'
forestos l' amatin'.
Nur estas vizio ŝi pala,
Neniam vivis ŝi,
kaj eĉ se ŝi estas reala
ŝin tamen ne trovus mi.*

Trad. John Lundgren.

SVEDA KRONIKO

EKSJÖ ESPERANTO SOCIETO jar-kunvenis 7. 9. Oni decidis aranĝi kurson por komencantoj. La konversacia kurso daŭrigos sian laboron. Oni ankaŭ aligis la societon al Jönköpings läns distrikt av Svenska Esperanto-Förbundet.

ENSKEDE. 17.9. Komenciĝis progresaj kaj komencaj esperanto-kursoj ĉi tie en nova bela ejo "Ungdomens hem". La komencan kurson partoprenas 16 gejunuloj kaj la progresan 6 gelernantoj.

ESKILSTUNA. 25.9. Kunvenis "La Stelo". La ĉefa punkto estis parolado de s-ro Pamperov, Bulgarujo, pri "la lando de la rozoj", popoloj kaj kutimoj. 9.10. Kunveno kun diskutado pri nia studlaboro. S-ro Tibor Czitrom gvidas kursojn dum la aŭtuno; 23.10. Regis la virinoj: estis "jupa vespero". S-ino Ågren parolis pri la voĉdonrajto de la virinoj dum la tempoj; jupkantĥoro kantis specialajn jupkantojn, entute sukcese.

HÖGANÄS. Kurso por 26 partopren., gvidas H. Levy el Germanujo; kursoj en SDUK; kurso por infanoj kaj unu por virinoj; unu konversacia rondo laboras.

MALMÖ. 21.9 Propagandkunveno en restoracio Gillet. Plenplena ejo. Agitparolado kun lumbildoj de s-ro Jan Strönne, dialogo en esperanto k.t.p. Granda intereso, multe da aliĝoj al kursoj. Post paŭzo aparta kunveno por la klubanoj, dum kiu la prez. montris lumbildojn de la kongresoj en Malmö kaj Stockholm. — Depost komenciĝo de la studsezono laboras du kursoj por komencantoj kaj kvar studrondoj por progresintoj.

18.10 okazis "Estonia vespero". En Klubo Esperantista s-ro Nils Olsson el Höör lerte kaj bele kun lumbildoj rakontis pri la postkongresa vojaĝo al Estonio. La vespero estis la dua en serio da tiaj vesperoj, aranĝitaj sub lerta gvidado de nia klubmastro s-ro Jan Strönne.

— Socialdem. Esperantoklubo solenis sian kvinjaran ekziston 20.10. Oni solenparoladis, toastis, rememoris pri okazintaĵoj, hurais. Gratuloj alvenis. Komuna vespermanĝo, amuzprogramo kun i.a. apero de la esperanta kantisttrio "Vigleco". La festeno finis per dancado.

Sturondo por novkomencantoj komencis kun Ernst Andersson kiel gvidanto. *Ĉeestinto.*

STOCKHOLM. Tre komprenebla afero estas, ke Grupo esperantista de Stockholm dum la tuta somero havis sufiĉe grandan laboron, ĉar ĝia laborkampo ja estas la urbo de la kongreso, nun tenata en bona memoro. La grupo devis pensi pri multaj detaloj kaj unu el ili estis: Dum la grandiozaj kongresaj baloj, ĉu la stokholmanoj tiam devas esti "murkokoĵ". Ĉar montriĝis, ke ni nur malbone sciopovis la dancan arton. Pro tio la grupo aranĝis danckurson dum ses el la someraj kunvenoj. En unu el tiuj d-ro Hirana el Japanujo tamen vizitis la klubon kaj interese parolis donante al la ĉeestantoj mallongan lecionon en la japana lingvo.

15.8. Parolis kelkaj eksterlandaj kongresanoj, kiuj ankoraŭ restis en Stockholm.

28.8. Prezentiĝis s-ro Orenge el Milano belan filmon pri Italujo, la lando de la XXVII-a, kaj donis klarigojn pri la en Romo, Napoli kaj sur la Meza maro okazonta venontjara kongreso. Krom tio ankaŭ parolis Jean Forge kaj Dagobert Kossmann, la reĝisoroj de la esperanta sonfilmo "Morgaŭ ni komencos la vivon".

29.8. Parolis Edmund Zcheile, Germanujo, pri vojaĝo tra la mondo kaj Grenkamp-Kornfeld pri la belaj svedaj fraŭlinoj.

5.9. Pri "Bulgarujo, la lando de la rozoj", parolis s-ro Pamperov.

12.9. Kunveno por ĉefe grupaj aferoj. 19.9. Okazis instrua parolado de la prezidanto, s-ro Hedgren, pri la nuboj, kaj aranĝis s-ro Julin kelkajn legocirklojn. (Tion imitu kiel eble plej multaj kluboj en nia longa lando. Aĉetu kolekton da libroj kaj lasu ilin rondiri al ĉiuj membroj. Do vi por tre malalta kotizo havos la okazon legi multajn interesajn librojn kaj vi ekzercos Esperanton ĝuante la literaturon.)

26.9. S-ro Weber, Berlin, en amuza maniero detale rakontis pri la studenta vivo en Germanujo kaj s-ro Gerdman montris arbon de belaj bildoj el sama lando.

3.10. Parolis s-ro Morariu pri siaj spertoj en Esperantujo.

10.10. Granda propaganda vespero en la Koncerta domo vizitata de pli ol 200 personoj. Post enkonduka parolado de s-ro Malmgren, s-ro Morariu mallonge

parolis kaj faris sian tre amuzan kaj interesan provlecionon laŭ la Ĉe-metodo. Okaze de la rezulto de tiu verspero s-ro Morariu nun gvidas plurajn bone vizititajn kursojn en Stockholm kaj Vaxholm.

17.10. Parolado de s-ino Julin pri "Klavarskribo", nova sistemo por muziknotoj.

24.10 aperis nova gaja kaj interesa numero de la "Viva Gazeto".

En Stockholms Högskola d-ro Szilágyi ĉiumerkrede (je la 18.30) vere instrue, amuze kaj neforgeseble parolas pri la literaturo de Esperanto kaj ĉiu-vendrede (je la sama tempo) pri la historio de Esperanto. Stokholmaj esperantistoj: Vi akiros grandan plezuron vizitante tiujn prelegojn.

En la lernejo de la poŝto s-ro Sigvard Håkansson instruas Esperanton al la poŝt- kaj telegrafistoj. S-roj Nordkvist kaj Hägglund de kelka tempo gvidas komencajn kaj daŭrigajn kursojn en Stockholms Högskola. S-ino Julin gvidas komencajn kursojn en "Södra Latin".

S. H-n.

SUNDSVALL: 25.9—30.9 ĉirkaŭ 600 personoj vizitis la sukcesplenajn prelegojn de s-ro redaktoro Hadzi Mustapha Raden.

Por daŭrigaj kursoj

estas rekomendinde uzi la svedan numeron de Literatura Mondo. Tiu numero estas tiel enhavriĉa, ke studrondo povas dediĉi tutan sezonon al studado de la interesaj artikoloj. El multaj vidpunktoj oni ne povas trovi pli bonan materialon por daŭriga kurso. La numero kostas 1 kr. (afranko enkalkulita) kaj estas mendebla ĉe:

26-a Universala Kongreso de Esperanto, Drottningatan 18, Stockholm. Postgiro-konto 50443.

SOS-anoj!

Ne forgesu sendi gratulokarton al la stacioj, kiuj sendas esperante. Mi bedaŭras ke Brno ne ricevis eĉ unu karton danke el Svedujo. Tiel ne estu. Sendu vian karton kaj vian ŝilingon al Gustav Henriksson, Brommagatan 32, Helsingborg. Li prizorgos la plusendadon. La kotizon vi povas pagi per poŝtmarkoj. Ne prokrastu! Neniom vi ricevos sen klopodo aŭ danko por alies klopodo. Ni danke salutas al la pioniroj en aliaj landoj.

Via SJn.

La propaganda semajno

en Blekinge vokis grandan atenton en la tuta provinco. Ĉie oni vidis la bonajn afiŝojn kun verda stelo kaj propaganda teksto. 1000 tiaj estis disdonataj. La gazetaro bone raportis kaj la propagandaj paroladoj kaj provlecionoj estis kompare bone vizititaj. Ĉiuvespere oni aranĝis provlecionon kaj propagandan paroladon en nova loko. Instruisto Hans Fox el Danzig parolis en aŭlo de la gimnazio en Karlskrona pri Danzig kaj Zoppot kaj faris provlecionojn en multaj malsamaj lokoj. D-ro Bjarne Beckman, instruisto Henry Ysner kaj instruisto Fritiof Ahnfeldt helpis per propagandaj paroladoj kaj interpretado. En la komenco de oktobro oni komencis kursojn de s-ro Fox en Karlskrona, Ronneby, Nätraby kaj Kallinge. Partoprenas ĉirkaŭ 100 gelernantoj inter ili 14 geïnstruistoj. S-ro Fox ankaŭ gvidas kursojn daŭrigajn en Karlskrona kaj Ronneby. En aliaj lokoj ankaŭ laboras studrondoj. S-ro Fox ankaŭ faris paroladon per radio Karlskrona.

F. A-dt.

KARLSKOGA. Antaŭ la "verda semajno" ni persvadis la posedanton de la ĉi tiea librovendejo mendi lernolibrojn k.t.p. kaj elmontri ilin en unu el la montrofenestroj. Tion li faris, kaj per helpo de la klubo oni ornamis la fenestron per eksterlandaj poŝtkartoj kaj grandaj propagandtekstaĵoj. La klubo propagandis per propraj afiŝoj kaj flugfolioj pri la kursoj. Ĉio ĉi rezultis en tre granda partoprenantnombro. 5 studrondoj (4 komencaj kaj 1 daŭriga) kun ĉ. 60 pers. laboras vigle. Ĉiuj estas aligitaj al A.B.F.

Ulmo.

La koro.

De Bo Bergman.

La koro ĝermas de sonĝoj,
aŭ estas la kor' malriĉa.
Ho vivo, lasu flui la pluvon,
ho vivo, lasu brili la sunon,
do ni vidos kun danko en la koro
la spikon fine flaviĝi,
la semado bele florados
do ni iros al rikolt' abundanta
kaj silenta vintra malvarmo.

Trad. Ingrid Selander.

La reveno el la libertempo.

La memstarulino venis hejmen post la libertempo

La lumoj de la urbo renkontis min plej unue el ĉio. Jam de longa distanco mi vidis ilin. La tuta ĉiela arkaĵo koloriĝis de la brilo. Nenio estas tia, kia la lumo!

Poste renkontis min la bruo. Estas la instigo de la motoroj ekmovigitaj de la homo, kiu ne povas vivi sen rapidego, kaj ofte devas morti pro ĝi.

La domo ĉe la strato kuŝis, kie mi lasis ĝin. Ne ĉiam la domo restas tie, kie oni lasis ĝin antaŭ la forvojaĝo.

Ĉio estas sama, en la lifto kaj en la vestiblo. Kiam mi metis la ŝlosilon en la ŝlosiltruon mi sciis, ke interne ĉio devas esti la sama. Tie neniu atendos min kun kafopleto, kaj la servistino ne estos tie, ŝi estos for. Mi komencas vigligi min per tio, ke en tiuj ĉi tempoj oni tamen devas esti ĝoja, se ĉiuj objektoj restas en la loĝejo. Estas ja tio senlime agrabla. Pripensu, kiom multe da ŝteloj estas raportitaj en la gazeto! Ĉiuj objektoj ja restas! La malnovaj, karaj mebloj aspektas preskaŭ gajaj, ke iu venis hejmen kaj zorgas pri ili. Malnovaj mebloj ne estas gajaj en tiuj ĉi "funkis"-tempoj.

Kaj tie! Tie kuŝis ja tuta amaso da leteroj, — 5 leteroj kaj unu poŝtkarto. Mia melankolia sento malaperis kiel butero por la suno. Ĝis kiam mi ricevas leterojn, kaj ili atendas min sur la tablo, mi ne estas forgesita.

La unua letero estas de la Elektra oficejo kun instigo pagi la konsumitan energion je kronoj 10:50.

La dua letero estas granda! "Litt. A. Gustaf Vasas Taxeringsdistrikt", mi legas tra la koverta. Temas pri la monsumo, kiun oni devas pagi, la unuan duonon en Novembro, kaj la alian duonon en Aprilo.

La 3-a letero estas de la Regna Telefon-Oficejo kun la instigo baldaŭ pagi 20 kronojn.

La 4-a estas memorigo pagi la gason. La sumo: kronoj 3:75.

La 5:a! Asekura-societo Viktoria zu Berlin: ne forgesu ensendi la premion, kronoj 8.

La poŝtkarto estis sendita de Kiruna, dum la Laplanda vojaĝo, de esperanto-amiko kaj mi mem, kun salutoj al mi mem por malhelpi kaj mortigi la sol-

ecan senton ĉe mia reveno al mia kara, malgranda, sola hejmo.

Oni neniam estas sola kaj tute forgesita kiam oni ricevas leterojn

Pilan.



Affisch-tavlor.



S.E.F. har låtit iordningställa affisch-tavlor för esperantoklubbarnas räkning. Affisch-tavlan eller affisch-skåpet i storlek innermått 35×65 cm, försett med glasdörr och lås, kostar inber. fraktkostnaden endast 9:75 kr. Detta låga pris är beroende på att ett större antal beställt på en gång. Varje klubb bör på sin ort uppsätta en sådan affisch-låda och därigenom bli i tillfälle att ständigt låta platsens allmänhet få del av nyheter om esperanto och genom esperanto. Tillse att affisch-lådan alltid innehåller nyheter, intressanta vykort, upplysningar o.s.v. Allmänhetens nyfikenhet väckes och hålles på så sätt vid makt.

Dessa affisch-lådor kunna alltså bli av utomordentligt värde ur reklamsynpunkt, varför ingen klubb bör underlåta att skaffa sig en sådan.

Beställes hos Svenska Esperanto-Förbundet, Fack 698. Postgiro 2002. Stockholm.

Filmo pri la XXVI-a.

San de nov. s-ro J. Raverstein el Hago prezentis en Groningen (Nederl.) filmojn pri la tri lastaj internaciaj Esperanto-kongresoj. Antaŭ la paŭzo li montris la filmojn pri la Pariza kaj Kolonja kongresoj. Post la paŭzo sekvis la belega filmo pri la XXVI-a, tiu daŭris 1 horon. La filmo konsistis el kvar partoj, nome: la vojaĝo tra Kopenhago kaj Oslo al Stokholmo, la kongreso mem, diversaj naciaj kostumoj kaj la post-kongresa vojaĝo tra Lapplando.

Sur la filmbildoj ni revidis nin mem kaj multajn konatulojn en Stokholmo, antaŭ la kongresejo, dum la abunda lunĉo ĉe la urbdomo, en la urbo, en Salt-sjöbaden, en Upsala, trinkante "mjöd"; ni denove renkontis konatajn esperantistojn, la familion Zamenhof, d-rojn Bastien, Kash, Dahl, Jansson, Malmgren k.t.p. Mallonge dirite: la filmo estis la plej bona rememoro pri la 26-a, kiun oni nur povas imagi!

Kinofilmo kaj propagando.

Multe da esperantistoj dum kongresoj kaj je aliaj okazoj filmis per 16-milimetra filmo. Kial ne el tiuj filmscenoj pretigi propagandilojn por esperanto? Tiaspecaj helpiloj en la esperantopropagando certe estus tre valoraj: ekzemple dum la prepara laboro por kursoj, je propagandvesperoj, ekspozicioj ktp. Ankaŭ la filmoj estus tre taŭgaj por variigi la programon dum klubkunvenoj.

Tiuj samideanoj, kiuj eventuale havas tiajn filmetojn kaj volas favorigi la bonon de esperanto, estas petataj sendi la filmojn al la suba adreso. Bonvolu indiki, ĉu vi donas rajton kopiigi la filmojn, aŭ ĉu vi volas vendi ilin je memkosto. Ankaŭ mallongaj scenoj estas tre taŭgaj. La kopiotaj filmoj estos resendataj en bona ordo. Kiam la tuta filmo estos preta, la kluboj povas pruntedoni ĝin kun aŭ sen kinoaparato je la eble plej malkara prezo.

Sven Eriksson-Sten, Postfack, Uppsala.

Esperanto en polaj radiostacioj.

Niaj polaj samideanoj atingis bonan rezulton en la radiaj rondoj. Dum la aŭtuno estos disaŭdigata esperantoprogramo ĉiusemajne el Krakow kaj Warszawa, eble ankaŭ el aliaj stacioj. La temoj estas diversaj kaj interesaj. Post aŭskultado oni petas pri danko al *POLSKIE RADJO, WARSZAWA.*

Sjömännens jul.

Sjöfartsnäringsens andel i Sveriges ekonomiska utveckling är av allra största betydelse. Den, som vill visa sin erkänsla för sjöfolkets samhällsnyttiga och försakelserika gärning bör göra detta genom att skänka en julgåva till de sjömän som få fira julen fjärran från hem och fosterland. En lämplig gåva torde utan tvivel Svenska Esperanto-Förbundets korrespondenskurs vara. Var och en som läser detta kan säkert undvara en slant. Bered sjömännen en glädje till jul samtidigt som ni propaganderar för esperantorörelsen genom att sända 1 krona till en sådan kurs, som vi sedan sända till någon av sjömanshemmen i utlandet.

Vi publicera namnen på givarna i kommande nummer av tidningen. Ett litet brev, med givarens namn och adress bör ej saknas.

Sänd pengarna och breven till Förlagsföreningen Esperanto, Box 698, Stockholm. Postgiro 578.

Glöm ej att anteckna på *anvisningens* kupong och brevet till emottagaren "Sjömännens jul".

Gåvor till "Sjömännens jul":

Sam Jansson, Lidingö 10 kr.

Engelska och esperanto — i "European Herald".

Den gamla invändningen "ja men engelsmännen kommer aldrig att bry sig om esperanto" vederlägges då och då på det kraftigaste av fakta.

Nu senast når oss meddelandet, att den varje vecka utkommande "European Herald", vars spridningsområde torde vara större, än vad namnet antyder, från och med den 28 september i år upptagit esperanto bland de fem övriga språk, på vilka tidningen tryckes: engelska, tyska, franska, spanska och italienska. Esperantoavdelningen kommer att redigeras av Internationella Esperantoförbundets delegerade för England, hr Fred Wadham, som är medlem av esperantorörelsens språkkommitté.

"European Herald" brukar kunna fås på mera betydande platser i vårt land, men kan eljest rekvireras direkt från utgivarna mot en postverkets eller Universella Esperantoförbundets svarskupong, adress 110 Fleet Street, London E. C. 4.

Esperanto-kongressens eftermäle.

Knappast någon esperantokongress, med undantag för den allra första i Bologna-sur-mer, torde ha väckt en sådan uppmärksamhet ute i världen som Stockholmskongressen. Den storslagna avslutningen och det gedigna programmet, komponerat icke minst i syfte att ge ett mäktigt intryck på den stora allmänheten, tycks komma att överallt utgöra en synnerligen kraftig drivfjäder för det fortsatta esperantoarbetet. Om så är, måste konstateras, att Stockholmskongressen verkligen gav, vad vi svenskar avsågo och väntade av kongressen.

Här är ej plats att referera alla de tacksamhetskrivelser, som inströmmat om kongressen, eller att redogöra för de utländska esperanto-tidningarnas älskvärda artiklar om kongressen. Men det kan vara av intresse, att höra, vad U. E. A:s direktions meddelat i oktober-rapporten till U.E.A:s styrelsemedlemmar:

"Generala situacio en septembro-oktobro".

Ekstere la propagando restis sub la impreso, kiun kaŭzis la bone sukcesinta kongreso en Stokholmo. Raportoj en la esperanta gazetaro kaj sciigoj ricevitaj pravas, ke la ne-esperanta gazetaro en multaj landoj atentis la dudeksesan: eĉ en Aŭstralio, kie dum pluraj jaroj ni ne sukcesis vekti intereson pri nia mondkongreso. La propagando vigligis multajn landojn por preparo de la vintra laboro."

Gastoj ĉe la kongreso:

Fino Jörgensen el Hamar. — La norvega pioniro Bonnevie, Oslo. — Adorantinoj strindbergaj.

Drömmen om Italien.

Ett 50-tal överförtjusta italienare lämnade Stockholmskongressen i mitten av augusti för att återresa till sitt land. Deras avskedshälsning var: "Vi möts hos oss nästa år i Italien. Vi ska ordna så bra och billigt som möjligt för er allihop".

Och nu äro de förberedande kostnads-kalkylerna färdiga. Det visar sig, att från Trelleborg till Italien och uppehållet där enligt följande program och återresa till Stockholm blir kostnaden allt som allt 300 kr. Då erhålles:

Torsdagen 1 aug. kl. 8,15: Avresa från Trelleborg till Berlin, dit vi anländer kl. 19,10. Nattlogi.

Fredagen 2 aug. kl. 8,13: Avresa från Berlin till italienska gränsen.

Lördagen 3 aug. i Firenze: Middagsmål. Rundtur genom staden. Sommaruniversitetet öppnas. Supé. Interkonatiga vespero. Nattlogi å hotell.

Söndagen 4 aug. i Firenze—Rom: Morgonmål. Resa. Middagsmål. Rundtur genom Rom. Supé. UEA-sammanträden. Nattlogi.

Måndagen 5 aug. i Rom: Morgonmål. Besök i Vatikanen. Öppningstidighet. Officiellt mottagande. Nöjeskväll. Nattlogi.

Tisdagen 6 aug. i Rom: Morgonmål. Roms forum. Litterär afton. Nattlogi.

Onsdagen 7 aug. i Rom: Morgonmål. Olika sammanträden. Internationell bal. Nattlogi.

Torsdagen 8 aug. i Rom—Neapel: Morgonmål. Resa. Middagsmål. Rundtur i Neapel. Nattlogi.

En Via Latina-konferens de la kongreso

Fredagen 9 aug. i Neapel: Morgonmål. Utflykt till Pompei och Capri (tåg och båt). Vesuvius. Middagsmål. Rundtur på ön Capri. Supé. Nattlig fest på havet. Nattlogi.

Lördagen 10 aug. i Neapel: Morgonmål. Valfria utflykter. Kongressens avslutning kl. 15,30. Avresa till Sverige kl. 17,00.

Måndagen 12 aug.: Ankomst till Trälleborg kl. 20,20.

Men den som vill följa med på en Medelhavs-kryssning, stiger ombord i Neapel den 10 på e.m. och får besöka bl. a. Syrakusa, Malta, Tripolis, Palermo, Elba och resan avslutas i Genua. Den färden varar till nästa lördag. Svenskar, som därefter fara direkt hem från Genua, beräknas var i Trelleborg måndagen den 19 aug. kl. 20,26. Medelhavskryssningen kostar i billigaste klass ung. 130 kr. varvid resor, mat, logi och olika utflykter ingår i priset.

Den som räknar med att delta i Romkongressen bör ej dröja för länge med inbetalning av kongressavgiften, då t. o. m. 31 jan. 1935 erhålles ganska stor rabatt.

A. full avgift: 70 lire (grundavg. 100 l.)
B. familjemedl.: 42 lire (grundavg. 60 l.)
C. ungdom: 28 lire (grundavg. 40 l.)

1 lire är f.n. 35 öre. Kongressavgifter kunna insändas till Esperanta Turista Komisiono, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Postgirokonton 50360. ETK, som även ordnar den svenska karavanen, kommer att under våren iordningställa särskilt prospekt. ETK står f.ö. i intim kontakt med italienska kongresskommittén och kan lämna behövliga upplysningar om kongressen och resan.

Saluton de italaj esperantistoj

al la svedaj samideanoj.

Karaj svedaj amikoj!

Ni italoj, vizitintaj la brilan 26-an Univcrsalan Kongreson en Stokholmo, revenis de vi kun la plej profunda sento de danko admiro al vi, kaj kun nostalgio kaŝita en la fundo de nia koro: la nostalgio pri via mirinda, paradiza lando, kiun ni nun nomas "la lando de la feliĉo".

Nenia pli trafa propagando por Svedlando, ol bone sukcesinta Esperanto-Kongreso. Ni ne sufiĉe konis tiun vastan, pacan landon de l' Nordo: ĝiajn senfinajn arbarojn, ĝiajn lagojn senombrajn, kies glata akvospegulo rigardadis kviete kaj melankolie al la ĉielo; ĝiajn antikvajn monumentojn, perfekte harmoniantaj kun la naturaj belaj: ĝian majestatan kaj ĉarman ĉefurbon, kiu pli ol simpla admiro, trudas amon. Ni ne sufiĉe konis precipe tiun popolon lojalan kaj afablegan, kies virtojn ni dezirus konstati ĉie en la mondo, kaj certe konstato, se la homaro estus tia, kia ĝi devus

Per nia 26-a, Svedlando gajnis definitivajn amikojn. Kaj nun, ni italoj, ni laborantaj febre por la sukceso, se eble egala, de nia 27-a, ni kun amika korinklino salutas ĉiujn eksterlandajn kongresanojn, sed tamen, niaj plej preferataj gastoj, niaj "amikoj de l' koro", nu, estas la svedoj. Por akcepti ilin, la temperaturo de nia entuziasmo estos unu gradon pli alta

Dum la Laplanda ekskurso: Orengo, Italujo, trovis energian gvidanton. — Zamenhofeto. — Müller, tre bonhumora germano. — Eksurbestro Lindhagen en bona akompano.



Från Riksstudieledaren.

Samarbete.

Såväl IOGT:s som NTO:s studieledning står nu Svenska Esperanto-Förbundets studieledare fr. o. m. i år i intim kontakt med. Det har nämligen ingåtts en överenskommelse, vilken innebär, att de nämnda organisationerna hänvisa de cirklar, som ämna studera

Anstataŭ laponoj kaj boacoj, ni provos prezenti al ili la palmojn de la Afrikaj oazoj, la barakanojn de niaj araboj kaj negroj; anstataŭ la fjordoj kaj kana-loj, la kanaletojn de Venezia kaj la mil-koloran Golfon de Napoli; anstataŭ la ravaj kajoj kaj pontoj de Stokholmo, la grandajn monumentojn de Roma. Ni provos klopodi, por ke ilia longa vojaĝo al sudo restu por ili la ĉefa, plej dolĉa memoro de la vivo, kiel por ni mem la granda vojaĝo al la lando de la nokto-meza suno.

Tiel teksigās la reto de la reciprokaj sentoj de simpatio: tiu reto kiun sopiriĝ nia Majstro, kaj kiun inteligenta turismo kaj Esperanto en praktiko ligas ofte pli rapide kaj pli firme, ol nebulaj rutinparoladoj, aŭ severaj principoj de revteoriuloj.

Ĉar, se vojaĝi estas vidi kaj lerni, vojaĝi per Esperanto estas, vidi, lerni, kompreni, amikiĝi, ami.

Kaj ni nun atendas aliĝojn de centoj kaj centoj da vojaĝemaj, kongresemaj svedoj!

La italaj esperantistoj.



Insigno de la Roma Kongreso.

